
# INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO Poletim Informativo de Ligo Brasileira do Eventrento

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República, 54 - 29 andar - Tel. 232-6309 20.211 - RIO DE JANEIRO - BRASIL





### VICTOR SADLER SALUTAS LA BRAZILAN ESPERANTISTARON

La 10-an de marto, D-ro Victor Sadler, antaŭa Ĝenerala Direktoro de UEA, flugis al Eŭropo post preskaŭ dujara restado en Brazilo. Dum tiu tempo, li konatiĝis detale kun la Esperanto-movado ĉi-lande kaj, laŭ komisio de la Estraro de UEA, ellaboris serion da rekomendoj pri estonta pli intima kunlaboro inter UEA kaj la brazilaj Esperanto-orga nizaĵoj. Li nun pritraktos tiujn proponojn kun la centraj organoj de UEA.

Dum la restado en Brazilo li loĝadis en la bieno "Bona Espero"en Goiás kaj servis kiel volontula instruisto en ĝia lernejo.

En Nederlando, li daŭrigos sian kunlaboron kun la komputil-progra ma entrepreno BSO, kiu konstruas novspecan sistemon de duon-aŭtomata tradukado, kun Esperanto kiel pontolingvo inter la naciaj lingvoj. (Pri tiu temo Sadler prelegis dum la kongreso en Campinas).

Antaŭ ol forflugi, D-ro Sadler ankoraŭfoje vizitis la sidej**on** de BEL kaj transdonis jenan mesaĝon:

"Karaj geamikoj en Brazilo,

Estis mia intenco skribi persone al vi ĉiuj - Esperanto-organizaĵoj, familioj, unuopuloj - kiuj per sia kunlaboro, gastamo aŭ simpla amikeco agrabligis al mi la pasintajn 21 monatojn en Brazilo kaj helpis min iom post iom orientiĝi en fremdaj kulturo kaj lingvo. Tamen la granda nom bro de tiuj, al kiuj mi ŝuldas dankojn, praktike malebligas tion. Des pli volonte, do, mi kaptas la okazon proponitan de BEL por varme danki kaj saluti vin per ĉi tiu publika alparolo, kaj por pardonpeti - laŭ tiu speciale brazila maniero - pro "alguma coisa", kiun mi eventuale kulpis. Mi deziras al ĉiuj kuraĝon, entuziasmon kaj pluajn sukcesojn en la laboro por Esperanto. Ĉi tiu mia kvara kaj ĝis nun plej longa vizito al Brazilo certe ne estos la lasta, nek, mi esperas, la plej longa!"

### KULTURKUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL - PROGRAMO POR MAJO/85

- 04/05 KONVERSACIA RONDO (informoj, poezio, muziko, anekdotoj, skeĉoj, vortludoj ktp ...)
- 11/05 Prelego de S-ano Floriano Pessoa pri la temo "ESPERANTA ETIMOLOGIO".
- 18/05 KONVERSACIA RONDO
- 25/05 POEZIA VESPERO (Ĉiu kunportu sian preferatan poemon por prezentado; specialaj invititoj: Sylla Chaves, Diderto Freto kaj Jorge Soares das Neves).
  - \* Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la 16a. horo \*

### NOVAĴOJ PRI BEL

PREZIDANTO DE BEL VIZITAS "ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO" - La 2-an de marto, S-ano Fernando Marinho, Prezidanto de BEL, vizitis la sidejon de São Paulo Esperanto-Asocio . Tiam, li havis okazon kontakti kun la tieaj samideanoj kaj interŝanĝi ĝeneralajn ideojn pri la brazila esperanto-movado. Li ankaŭ profitis la ŝancon de la vizito kaj ĉeestis al la Konversacia Rondo, gvidita de S-ano Dias Pinto, por informiĝi pri ĝia funkciado.

ENKLASAJ KURSOJ ĈE BEL - La 2-an de marto, komenciĝis, en la sidejo de BEL, la enklasaj kursoj de la unua semestro ĉi-jare. La Baza Kurso estas gvidata de S-ano José Bonifácio, dum la Progresiga de S-anino May Bijleveld. La lecionoj okazas ĉiusabate, matene, kaj la kursoj daŭros ĝis la 13-a de julio. Al la baza kurso enskribiĝis 15 lernantoj.

KULTURKUNVENOJ, EN LA SIDEJO DE BEL, EN MARTO - Kun la meza partopreno de 15 personoj, okazis, dum marto, ĉiusabate, je la 16-a horo, en la sidejo de BEL, kulturkunvenoj. La 2-an, samideano Jair Sales trafe prezentis la temon "Enkonduko al la Interlingvistiko". La 16-an, S-anoj Aloisio Sar torato kaj Luiz Alberto Martis debatis la temon "Parlamenta aŭ Prezidenta Reĝimo" kaj la 30-an, S-anino May Bijleveld klarigis al ni interesajn aspektojn pri "Radiestezo". La 9-an kaj la 23-an, okazis "Konversaciaj Rondoj", kun aktiva partopreno de la ĉeestantoj.

EL NIA VIZITLIBRO - "Estas aparta plezuro por mi esprimi mian estimon kaj bondezirojn por organizaĵo, kiu spite al grandaj malfacilaĵoj sukcesas nun jaron post jaro montradi konkretajn progresojn danke al la sindona laboro de la estraro kaj oficistoj. La spirito de malfermita kunlaboremo, kiun mi renkontis ĉe BEL, restas unu el la plej belaj memoraĵoj, kiujn mi forportas el Brazilo. Vivu tiu spirito!" Victor Sadler, 9/3/85.

### VIZITOJ AL LA SIDEJO DE BEL, EN MARTO/85:

02/03 - Cleber Lemos, el Salvador, Bahia

Jason Gonçalves de Lima, el João Pessoa, Paraiba

04/03 - Carlos Vieira Cruz, el Conselheiro Lafaiete, Minas Gerais 09/03 - Victor Sadler, el Alto Paraíso, Goiás

18/03 - Wilson Deslandes, el Barra Mansa, Rio de Janeiro

20/03 - José Luiz Ferreira, el São Paulo, São Paulo

### DONACOJ AL BEL EN MARTO/85:

Carlos Vieira Cruz, el Conselheiro Lafaiette, MG	Cr\$ 5.000
Alberto Luiz M. Chueiri, el Belo Horizonte, MG	
Lavi Toti Lava ol Dia la	2.079
Lavi Ioti Lara, el Rio de Janeiro, RJ	8.000
Lauro Coutinho, el Rio de Janeiro, RJ	
Celio Freitas Martins, el Rio de Janeiro, RJ	1.905
rattis, et kio de Janeiro, RJ	50.000

### LIVERITAJ DIPLOMOJ EN 1985 (ĝis la 31/03/85):

Baza: 28

Progresiga: 07

## ELDONITAJ DOKUMENTOJ EN 1985 (ĝis la 31/03/85):

Enspeznotoj: 415

Rembursaj enspeznotoj: 45

Fakturoj:19 Leteroj: 67

### ALIĜOJ AL BEL EN 1985 (ĝis la 31/03/85):

M-S: 239 (300) M-1: 115 (147) M-2: 20(24) D-M: 45 (34) B-M: 04 (04) Entute: 423 (509)

Interparenteze, la membraro/84

### ALIĜOJ AL UEA, EN 1985 (ĝis 31/03/85):

MJ: 06 MA: 60

MJ-K: 01 MA-K:05

Entute: 72

### ABONOJ EN 1985 (ĝis 31/03/85):

El Popola Ĉinio: 39 Heroldo de E-o: 29 Kontakto: 08 Internacia Komputado: 12

### "UM MILHÃO DE AMIGOS" REELDONITA

La vaste uzata portugallingva prospekto pri esperanto "Como ter um milhão de amigos" estis, denove, reeldonita de BEL. Oni jam akceptas mendojn.

Minimuma kvanto: 100

Prezo: 0,59 ORIN

### MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

KURSO DE ESPERANTO ĈE FEDERACIA UNIVERSITATO DE PARAÍBA - Laŭ informo de S-ano Jason Gon çalves, kiu vizitis nin la 2-an de marto, ekde la dua semestro de la pasinta jaro, funkcias re gula kurso de esperanto ĉe Federacia Universitato de Paraíba, en la nordoriento de Brazilo. La kurso estas gvidata de S-ano José Elias Borges, profesoro pri lingvoj en tiu Universitato kaj la lecionoj okazas dufoje semajne (lunde kaj merkrede, vespere), en la niveloj baza kaj progre siga.

BRAZILA VERKISTO ESPRIMAS SIAN SIMPATION PRI ESPERANTO - La brazila verkisto kaj poeto Affonso Romano de Sant'Anna esprimis sian simpation al esperanto en sia lasta libro lanĉita pa sintjare "Que país é este? e outros poemas". Sur paĝo 85, en la poemo "Gymnasium", li skribis jene:

"Feliz era meu pai, fugiu da escola

- mas sabia o Esperanto. Essa língua
sem história, sangue e medo
que não é coisa desse mundo

- mas língua de querubim"

(Laŭvorta traduko: "Feliĉa estis mia patro. Forkuris el la lernejo - sed scipovis Esperanton. Tiu lingvo sen historio, sango kaj timo, kiu ne apartenas al tiu ĉi mondo - sed estas anĝela lingvo").

En respondo al privata letero de nia S-anino Izabel Oliveira Santiago, la aŭtoro informis al ŝi, ke li verkis tiun poemon, kun la ĉi-supra citaĵo al Esperanto, omaĝe al la patro kaj liaj amikoj kiuj estis ĉiam fidelaj al la esperanta idealo.

KURSO DE ESPERANTO ĈE "FACULDADE DE FILOSOFIA, CIÊNCIAS E LETRAS DE VALENÇA" - Laŭ informo sendita al ni de S-ano Vicente Werneck, el Volta Redonda, RJ, 13 gelernantoj finis "Universitata Ampleksa Esperanto-Kurso"-n ĉe "Faculdade de Filosofia, Ciências e Letras de Valença". La propra Universitato liveris la diplomojn al la kursfinintoj kaj ĝi okazis sub la respondeco de Volta Redonda E-Klublo.

GRACILIANO RAMOS: ĈU ESPERANTISTO? - S-ano Fernando Marinho, tralegante malnovan numeron de Brazila Esperantisto (majo/junio 53), trovis la jenan nekrologon: "En marto mortis Gracilia-no Ramos, unu el la plej aktuale konataj brazilaj verkistoj, aŭtoroj de pluraj romanoj. Li okupis ankaŭ en sia naskiĝa ŝtato Alagoas kelkajn publikajn oficojn. Graciliano instruis Esperanton en Palmeira dos Indios, urbo en Alagoas, en 1915". Kiu povos aldoni pliajn informojn pri tio ke unu niaj plej gravaj verkistoj estis nia samideano?

KURSO DE ESPERANTO EN PETRÓPOLIS - Laŭ informo publikigita en SEI 883, de 2/3/85, okazas, nuntempe, kurso de esperanto ĉe "Centro de Cultura Alceu Amoroso Lima" kiu estas ligita al la Urba Administracio, sub la gvidado de S-ano Délio Pereira de Souza.



# LANĈITA LA 30AN DE MARTO KAJ SPECIALE TAŬGA POR PROGRESANTOJ

BRAZILA ESPERANTO-LIGO havas la plezuron informi la jusan lanĉon de la lasta ero de la kolekto LERNU KANTANTE de Sylla Chaves por helpi la instruadon de Esperanto en la tuta mondo.

La kolekto LERNU KANTANTE konsistas el

8 disketoj (kun kelkaj frazoj kaj dialogoj kaj entute

36 didaktikaj kantoj), 3 kantaroj (kun iliaj muziknotoj) kaj la ĵusaperinta samnoma facila legolibro. La

US\$ : aliloke	PREZOJ	
ong allione	ORTN	US:
facila legolibro	0,30	2.50
vortare to	0,06	0.50
8 disketoj, po	0,18	1.50
kantaroj, totalo	0,60	5.00
KOMPLETA KOLEKTO	2,16	18.00
SPECIALA OFERTO g	is 30.	06.85
HOMPLETA KOLEKTO:	1,80	ORTN

nura nacilingva parto de la tutaĵo estas unu LAŬPAĜA VORTARETO: portugala (jam preta), angla, franca aŭ hispana (baldaŭ aperontaj). Evidente, oni povas anstataŭe uzi iun ajn alian taŭgan vortaron. La legolibro kaj la tuta kolekto estas dividitaj laŭ facileco en tri partojn: elementa, meza kaj supera. Inter la 600 radikoj de la elementa parto troviĝas ĉiuj 520 el la facila listo de KONTAKTO; kaj inter la 1200 de la du unuaj partoj (elementa kaj meza) troviĝas ĉiuj 1000 el tiu revuo kaj ĉiuj 947 el grupoj 1 ĝis

6 de la AKADEMIO. Kaj la plejmulto el la novaj radikoj en la supera parto apartenas al la sepa grupo de la Akademio.

La aŭtoro ankoraŭ preparas sian kompletan metodon AŬDU KAJ LERNU, en tri niveloj, multe ple grandan ol ĉi tiu kolekto, kiun oni povas konsideri "elpreno el AŬDU KAJ LERNU". La ĉefa celo de ĉi tiu elpreno estas prezenti nun al la eksterlanda publiko iun ne tre grandan, sed kompletan tutaĵon. Ĝi povas esti uzata kiel nura kursmaterialo. Kaj ĝi povas ankaŭ esti uzata (kiel tutaĵo aŭ kiel disaj partoj) por kompletigi jam ekzistantajn metodojn en elementaj kaj daŭrigaj kursoj, por en-klasaj aŭ ekster-klasaj

taskoj. Ĝiaj multaj kantoj kaj bildoj certe helpos, ke la kurso fariĝu pli amuza. Kaj ĝia science elektita vortprovizo certe helpos, ke ĝi fariĝu pli efika.

### MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

### INFORMADO PRI ESPERANTO

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN 'MUNDO ESPÍRITA" - Duonpaĝa artikolo pri esperanto aperis en la spiritisma jurnalo 'Mundo Espírita' (nº 1.207, jan/85), eldonata en Curitiba (Rua Saldanha Marinho, 586). La aŭtoro estas nia S-ano Salvador Raimundo kaj la titolo de la artikolo estas: "Esperanto, Lição de Fraternidade".

ESPERANTO EN ''CORREIO DE SÃO FÉLIX'' - En sia eldono de la 24-a de februaro, la ĵurnalo ''Correio de São Félix (Bahia), eldonata en São Félix, publikigis noton pri la kurso de esperanto okazinta en Salvador kaj gvidita de Geraldo Mattos.

ARTIKOLOJ PRI ESPERANTO EN ''O DEMOCRATA'' - Sorocaba E-Klubo sendis al ni du novaĵojn pri la inter<del>n</del>acia lingvo publikigitajn en la ĵurnalo ''O Democrata'', de la 23-a de februaro. La titoloj estas respektive ''Esperanto não é lingua estrangeira'' kaj ''Prefeitura de Mairinque prestigia curso de esperanto''.

''NOVA APLICAÇÃO PARA O ESPERANTO NA SOCIEDADE DA ERA DOS COMPUTADORES'' - Tiu estis la titolo de la kontribuajo de nia S-ano David Bianchini, el Campinas, SP, al la loka periodaĵo ''Alavan-ca'', en februaro/85.

### INSTRUADO DE ESPERANTO

KURSOJ DE ESPERANTO EN LA SIDEJO DE BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO, EN RIO DE JANEIRO - Laŭ informo aperinta en ''Reformador'', nº 1871, ekfunkcias kursoj de esperanto en la sidejo de FEB, en Rio de Janeiro, ekde la 6-a de marto. Okazas elementa kurso, sub la gvidado de S-anino Jovelina Maia Rodrigues, kaj Konversacia Grupo, pere de legado de spiritismaj verkoj en esperanto.

110 PERSONOJ LERNAS ESPERANTON EN CAMPINA GRANDE - Laŭ informo sendita al ni de S-ano Afonso Camboim, 110 personoj enskribiĝis en la esperantaj kursoj organizitaj de "Kunigilo E-Klubo", el Campina Grande, Paraiba.

### DIVERSAJ

FONDITA ''ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DE BELO HORIZONTE'' - La 5-an de januaro, estis fondita ''Esperantista Asocio de Belo Horizonte'' (Rua Carijō, 141 s/807 e 808, Centro, 30.000-BELO HORIZONTE, MG). Jen ĝia unua estraro: Carlos Augusto Guedes (Prezidanto), Marcus Tulio de Almeida Flores(Vic-Prezidanto), Saide Pontes Albuquerque (Instru-Direktoro), Dalmo Soares Arantes (Financa Direktoro) kaj Ana Lúcia dos Santos Crespo (Societa Direktoro). La sidejo malfermiĝas, de lundo ĝis sabato, de la 13.00 ĝis la 18.00 horo.

AGADO ĈE LERNEJOJ EN RIO DE JANEIRO - S-ano José Rabello de Paula estas antaŭ ĉio persistema homo. Li planis viziti mezgradajn oficialajn lernejojn en kvartalo Tijuca, en Rio de Janeiro, kaj tie prelegi pri la internacia lingvo. Tamen, por fari tion, li devis havigi al si la oficialan permeson. Tiam, komenciĝis la malfacilaĵoj. Li devis pilgrimi tra diversaj sekcioj kaj paroli al multaj estroj. Post multfoja iro kaj reiro, li, finfine, sukcesis la necesan permeson. Kaj,la 11-an kaj 13-an de marto, okazis la unuaj vizitoj Temis pri lernejo "Laudinia Trota", kie S-ano Rabello faris specifan prelegon pri esperanto al la instruistoj kaj du prelegojn al la lernantoj. Krome, li ankaŭ sukcesis starigi ekspozicion pri esperantaĵoj en la korto de la lernejo. Sekvinda ekzemplo:

FONDITA "KOSMOPOLITA KONVERSACIA KLUBO" - Temas pri klubo kiu arigas la kursfinintojn de esperanta kurso okazinta por oficistoj de "Banco do Brasil", en Rio de Janeiro. Laŭ la bulteno PIB, marto 85, "la klubanoj elpaŝos kun la plano kooperativsisteme aboni gazetojn kaj revuojn, aĉeti librojn, publikigi anoncetojn por internacia korespondado kaj ĉiĉeronado de eksterlandanoj en Rio de Janeiro". La adreso por kontakto estas: "Konversacia Kosmopolita Klubo", Caixa Postal, 88 - 20.001- Rio de Janeiro, RJ.

NOVA ESTRARO ĈE KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ - En leteroj al ni senditaj, S-anoj Alvaro Fausto de Souza kaj Elma Nascimento informis nin ke la 9-an de marto estis elektita nova estraro por KKE: Dilermando de Castro (Prezidanto), Cedilha Netto (Vic-Prezidanto), Jurguy Monteiro Scherpel (Kasisto), Laura Carvalho (Unua Sekretario) kaj Aélia Scherpel (Dua Sekretario). Ni sincere deziras fruktodonan administrperiodon!

HUNGARA SAMIDEANINO SERĈAS KORESPONDANTON EN BRAZILO - 39-jara hungara samideanino deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn: Eva Vigyilan, Rakocni u. 1.B. III 9, 5900 Oroshaza, Hungario.